# Prelegoj pri Esperanto en la **IES** de Moreda

La 24an kaj 25an de majo okazis en la Gimnazio (mezgrada lernejo) de Moreda la t. n. ***9a Celebro de la Kulturaj Tagoj de Aller-Valo***. Ĉi-jare la titolo kaj temaro de la Celebro estis: ***Kulturo kaj Komunikado: La mil kaj unu lingvoj***. Kadre de tiu interesa aranĝo okazis diversaj konferencoj pri la temo de la idiomoj kaj aliaj esprim- kaj komunikad-rimedoj. Inter aliaj, ankaŭ nia Esperanta organizaĵo estis invitita partopreni pere de prelegado. La prelegoj pri Esperanto estis du, ambaŭ la 25an de majo, je la 8a horo kaj duono kaj je la 9a horo kaj duono. Gvidis ambaŭ konferencojn Faustino Castaño, sekretario de nia **Astura Esperanta Asocio**. La publiko estis gelernantoj (15-jaraj) kaj geinstruistoj de tiu centro. Por la prezentado de la temo oni disponis je taŭgaj aŭdo-vidaj iloj: komputilo konektita al Interreto, kanon-projekcilo… La publiko bone povis vidi la instru-materialon je kiu ni disponas por tiutipaj aktoj kaj kelkajn partojn de nia ret-paĝo.

Tial ke nuntempe ne estas facile aliri al la publiko por veki intereson pri la lernado de Esperanto, la aktoj kiel tiuj prelegoj estas interesaj por diskonigi nian aferon. Kompreneble, ne ĉiuj ĉeestantoj montris specialan intereson pri la Internacia Lingvo sed iuj inter ili kaj ĉefe la geinstruistoj atentis pri la ebleco ke la Eŭropa Unio promociu komunan lingvon kiel Esperanton por la interkomunikado ene de la Unio kaj la interrilatoj kun la ekster-Uniaj landoj.





# Datreveno de la Unua Libro en Esperanto

Dum tiu ĉi monato, julio de 2012, Esperanto celebras sian 125-an datrevenon. Ĝi estas motivo por ĝoji, kaj tial mi deziras, nome de la tuta estraro de HEF, gratuli vin kiel esperantiston, kaj kundividi la sentojn de gajeco kaj fiereco pri tio kion nia movado atingis ĝis nun.

La tago kiun oni ĝenerale konsideras kiel naskiĝdaton de nia lingvo estas la 26-a de julio, kaj ni volas kuraĝigi la anojn kaj la lokajn kaj regionajn asociojn ĝue celebri la datrevenon. Ne nur nun, sed dum la tuta jaro, sed la naskiĝtago estas ankaŭ bona okazo por informi la mondon pri la vivanteco kaj la eblecoj de nia kara lingvo, kaj ni invitas vin profiti tiun momenton. HEF-estraro planas sendi komunikon al la gazetaro, kaj havas aliajn planojn por la periodo post la ferioj, kaj via kunlaboro estos tre aprezata.

Ĝenerale Hispana Esperanto-Federacio deziras intensigi la agadojn por Esperanto, profitante ĝuste tiun ĉi datrevenon. Ni volas ankaŭ kreskigi la varbadon ne nur al Esperanto, sed specife al nia asocio. Pri tio, ĉiu ideo estas bonvena, sed ni ĉefe atendas ĉies kunlaboradon. En asocio de volontuloj, kiel nia, estas tre malmulto kion la estraranoj povas fari solaj. Ne hezitu kontakti nin por aldoni vian kontribuon.

Ni denove gratulas vin, kaj esperante ke vi ĝuos ne nur tiun ĉi datrevenon, sed la tutan jubilean jaron, vin salutas nome de la estraro,

José Antonio del Barrio